

Chomsky N. (2007). Approaching UG from below. En U. Sauerland & Gartner H.-M. (Red.), Interfaces + recursion = languages?: Chomsky's minimalism and the views from syntax-semantics (pp. 1-29). Berlin: Mouton de Gruyter.

Huck G. J. & Goldsmith J. A. (1995). Ideology and linguistic theory: Noam Chomsky and the deep structure debates. London: Routledge.

Itkonen E. (1996). Concerning the generative paradigm. Journal of Pragmatics, 25, 471-501.

Jenkins L. (2000). Biolinguistics: Exploring the biology of language. Cambridge, UK: Cambridge University Press.

Katz J. J. (1981). Language and other abstract ideas. Oxford: Basil Blackwell.

Nagata H. (1988). The relativity of linguistic intuition: The effect of repetition on grammaticality judgments. Journal of Psycholinguistic Research, 17, 1-17.

Nagata H. (1997). Kernvorto-parametro en genera gramatiko: Apliko al eldiroj de infanoj denaske lernantaj Esperanton. Scienca Revuo, 48, 34-43.

Nagata H. (2005a). Deveno de denaskismo pri lingvoakiro de Chomsky. Scienca Revuo, 56, 81-86.

Nagata H. (2005b). Konstanta stato kiel lingvoscio ĉe Chomsky: Ĉu ĝi estas efektive stabila kaj unuforma? Scienca Revuo, 56, 81-86.

Nagata H. (2007). Kunekzisto de formalismo kaj mensismo/realismo en la genera gramatiko de Chomsky: Kaŭzanto de teoriaj debatoj. Scienca Revuo, 58, 99-110.

Nakaya U. (1958). Kagaku no hoho (Metodo de scienco). Tokyo: Iwanami Shoten.

Seuren P. A. M. (2004). Chomsky's minimalism. New York: Oxford University Press.

Steinberg D. D. (1975). Chomsky: From formalism to mentalism and psychological invalidity. Glossa, 9, 218-252.

Steinberg D. D. (1976). Competence, performance and the psychological invalidity of Chomsky's grammar. Synthese, 32, 373-386.

Tomalin M. (2006). Linguistics and the formal sciences: The origins of generative grammar. New York: Cambridge University Press.

Adreso de la aŭtoro

Prof. Hiroshi NAGATA

Department of Clinical Psychology

Kawasaki University of Medical Welfare

288 Matsushima, Kurashiki 701-0193 / JAPANIO

<hinagata@mw.kawasaki-m.ac.jp>

Priaŭtora informo

La aŭtoro estas profesoro pri psiĥologio kaj speciale studas psiĥolingvistikon rilate al lingvoscio kaj ties akirado fare de denaskaj parolantoj.

Ĉu procedi genitiv-radike, kiel procedis Zamenhof?

Josef KAVKA

Zamenhof, elektante vortprovizon de Esperanto, ĉerpis unuavice el la latina lingvo, kies deklinaciado foje prezentas diferencon inter la radikoj nominativa kaj genitiva. Sufiĉu ekzemplo unusola: se el la vorto "*lepus*" oni deprenas la finaĵon *-us*, restas la nominativa radiko *lep'*. Tamen, la radiko genitiva – post la forigo de la deklinacia finaĵo *-is* – estas *lepor'*. *Zamenhof* do elektis la radikojn *lepor'*, ĉar ĝi estas produktiva: jen la latina adjektivo *leporinus*, la hispana *leporino*, same la itala, kie la substantivo estas *lepre*.

Sian preferon por la radikoj genitivaj *Zamenhof* (1906) dokumentis en sia "Universala Vortaro". En ĝi eblas trovi 73 ekzemplojn de la radikoj genitivaj. Jen ilia listo kun la ekvivalentoj latinaj:

n-ro	esp. radiko	lat. nominat.	lat. genit.
1	abat'	<i>abbās</i>	<i>abbātis</i>
2	akcipitr'	<i>accipiter</i>	<i>accipitris</i>
3	akrid'	<i>acris</i>	<i>acridis</i>
4	arbitr'	<i>arbiter</i>	<i>arbitrī</i>
5	artifik'	<i>artifex</i>	<i>artificis</i>
6	aspid'	<i>aspis</i>	<i>aspidis</i>
7	bov'	<i>bōs</i>	<i>bovis</i>
8	Decembr'	<i>December</i>	<i>Decembris</i>
9	dent'	<i>dēns</i>	<i>dentis</i>
10	diligent'	<i>diligēns</i>	<i>diligentis</i>
11	elefant'	<i>elephāns</i>	<i>elephantis</i>
12	elokvent'	<i>eloquēns</i>	<i>eloquentis</i>

13	eminent'	<i>eminēns</i>	<i>eminentis</i>
14	ezok'	<i>ezox</i>	<i>ezocis</i>
15	faring'	<i>pharynx</i>	<i>pharyngis</i>
16	feliĉ'	<i>fēlix</i>	<i>felicis</i>
17	filik'	<i>filix</i>	<i>filicis</i>
18	flor'	<i>flōs</i>	<i>floris</i>
19	font'	<i>fōns</i>	<i>fontis</i>
20	fort'	<i>fors</i>	<i>fortis</i>
21	front'	<i>frōns</i>	<i>frontis</i>
22	gent'	<i>gēns</i>	<i>gentis</i>
23	gland'	<i>glans</i>	<i>glandis</i>
24	hepar'	<i>hēpar</i>	<i>hepatis</i>
25	histrik'	<i>hystrix</i>	<i>hystricis</i>
26	indiferent'	<i>indifferēns</i>	<i>indifferentis</i>
27	jugland'	<i>juglāns</i>	<i>juglandis</i>
28	kalik'	<i>calix</i>	<i>calicis</i>
29	kalk'	<i>calx</i>	<i>calcis</i>
30	kankr'	<i>cancer</i>	<i>cancrī</i>
31	kantarid'	<i>cantharis</i>	<i>cantharidis</i>
32	kapr'	<i>caper</i>	<i>caprī</i>
33	klimat'	<i>clima</i>	<i>climatis</i>
34	konsonant'	<i>cōnsonāns</i>	<i>consonantis</i>
35	kruc'	<i>crux</i>	<i>crucis</i>
36	krur'	<i>crūs</i>	<i>crūris</i>
37	lakt'	<i>lac</i>	<i>lactis</i>
38	laring'	<i>larynx</i>	<i>laringis</i>
39	lent'	<i>lēns</i>	<i>lentis</i>
40	leon'	<i>leō</i>	<i>leōnis</i>
41	lepor'	<i>lepus</i>	<i>leporis</i>
42	limak'	<i>limāx</i>	<i>limācis</i>
43	link'	<i>lynx</i>	<i>lynxis</i>
44	Mart'	<i>Mars</i>	<i>Martis</i>
45	milit'	<i>mīles</i>	<i>militis</i>
46	minac'	<i>mināx</i>	<i>minācis</i>
47	mont'	<i>mōns</i>	<i>montis</i>
48	mor'	<i>mōs</i>	<i>mōris</i>
49	mort'	<i>mōrs</i>	<i>mōrtis</i>
50	nokt'	<i>nox</i>	<i>noctis</i>
51	Novembr'	<i>November</i>	<i>Novembris</i>
52	okcident'	<i>occidēns</i>	<i>occidentis</i>
53	Oktobr'	<i>Octōber</i>	<i>Octobris</i>

54	orient'	<i>oriēns</i>	<i>Orientis</i>
55	pac'	<i>pāx</i>	<i>Pacis</i>
56	particip'	<i>particeps</i>	<i>participis</i>
57	patr'	<i>pater</i>	<i>Patris</i>
58	perdrik'	<i>perdix</i>	<i>Perdicens</i>
59	pont'	<i>pōns</i>	<i>Pontis</i>
60	prezent'	<i>praesens</i>	<i>presentis</i>
61	prudent'	<i>prūdēns</i>	<i>prudens</i>
62	pumik'	<i>pūmex</i>	<i>Pumicis</i>
63	radik'	<i>rādix</i>	<i>Radicis</i>
64	reĝ'	<i>rēx</i>	<i>Rēgis</i>
65	sagac'	<i>sagāx</i>	<i>Sagācis</i>
66	salik'	<i>salix</i>	<i>Salicis</i>
67	salut'	<i>salūs</i>	<i>Salūtis</i>
68	Septembr'	<i>September</i>	<i>Septembris</i>
69	serpent'	<i>serpēns</i>	<i>serpentis</i>
70	silent'	<i>silēns</i>	<i>silentis</i>
71	silik'	<i>silex</i>	<i>Silicis</i>
72	sorik'	<i>sōrex</i>	<i>Soricis</i>
73	strig'	<i>strix</i>	<i>Strigis</i>

Male, da zamenhofaj radikoj nominativaj ekzistas en Universala Vortaro solaj 6, tio signifas 8,2%. Tiuj ĉi meritas konsideron apartan:

1. anas', anas, -atis. Por eterno restos enigme, kial *Zamenhof* ne adoptis la radikon genitivan, nome *anat'*. Ĉu ĝenis lin koincido kun la participa sufikso *-at*? Ja en lingvoj eŭropaj eblas konstati evidentajn spurojn de la latina genitivo, ekz. *de: Ente* (okcidentgermane *Ante*, oldgermane *anut*, basgermane *anet*, anglosakse *aened*), *es: anade*, *it: anatra*, *nl: eend*, *no+sv: and*. Notinda estas ankaŭ la kohereco nomenklatura: la famili-nomo *Anatidae* = anatedoj, la subfamili-nomo *Anatinae* = anatenoj. Jes, komunuze eĉ sciencpopularige povas servi la fundamenta formo "anaso"...

2. boraks', borax, -acis. Prave, la konsonanto "X" estas tre internacia – *cs: borax*, *de: Borax*, *es: bórax*, *en+fr: borax* k.t.p. Aliflanke, la formon genitiv-radikan havas *it: borace*. Por uzoj ĥemia, mineralogia (ekz. borac-perloj) k.s. povus servi "boraco"...

3. ibis', ĭbis, -idis. Ĉi-okaze tuj evidentiĝas, ke al *Zamenhof* ne povis plaĉi la formo "ibido", kiu suflorus konfuzon kun "ido de iu ibo". Sed ĉu tiaspeca konfuzo estus reala? La ido de ibido ja estus "ibidido"...

4. **ingven', inguen, -inis.** Oni komparu kun *cs*: *inguina*, adjektive *inguinalní*, *de+es+fr+pt*: *inguinal*, *it*: *inguinale*. Cele al la terminologia kohereco bone servus "ingvino" konforma kun *it*: *inguine*...

5. **mus', mūs, mūris.** Jen okulfrapas la timo de *Zamenhof*, ke okaze de la genitiva radiko *mur'* aperus grava homonimeco. Sed: ĉu reala kunteksto kapablas generi konfuzon inter la besteto kaj la solida konstruaĵo? Ĉu homonimofobio konvinkive pravigus la malplanlingvan nomenklaturon? Ja *Muridae* devus esti en Esperanto "muredoj", ĉu ne vere? Ja ankaŭ la fundamenta juro, kvankam netrovebla en *Universala Vortaro*, estis formita genitiv-radike: *iūs, iūris*, nun kohere al la neoficialaj jurisdikcio kaj jurisprudenco... Tamen, ĉi tiu nia konsidero neniom pridubu la komunuzan "muson"...

6. **nuks', nux, nucis.** La nominativa radiko detruas la naturan kohercon inter nucifrago ("nuks-rompulo") kaj la dezirinde genitiv-radika "nuco", *it*: *noce* kaj la kampania urbo *Nocera* (latine *Nūceria*, adjektive *Nūcerīnus*) proksima al Napolo, plue "Noceto" en Parmio, ĉiuj derivitaj genitiv-radike. Cetere oni komparu kun la latinaj *nucleus* kaj *nucula* NPIVE "nukulo", ne timanta la homonimecon kun nuk-ulo!). Sed denove: neniom riproĉinda komunuze devus esti la perfekte establita fundamentaĵo "nukso"...

Epiloge

La postzamenhofaj kreintoj – eĉ oficialigintoj – de la scienca leksiko en Esperanto iom pli ofte inklinis al terminoj nominativ-radikaj. Tio estas bedaŭrinda precipe el la vidpunkto de la terminologia kaj nomenklatura koherecoj.

Referencoj

Zamenhof L.L. (1906): *Universala Vortaro de la Lingvo Internacia Esperanto*. – *Hachette et C^{ie}, Paris*.

Adreso de la aŭtoro

RNDr. Josef KAVKA
Lužná 7 – Vokovice
CZ – 160 00 Praha
ČEĤIO

Priaŭtora Informo

La aŭtoro estas profesia geologo, doktoro de natursciencoj, kandidato de teknikaj sciencoj.

Fruktoterapio

– La kuraca povo de la fruktoj, kiuj donas la vivon –

Ljudmila KAŠTANOVA

Ĝeneralaj konataĵoj

La fruktoterapio konsistas el terapeŭtikaj teknikoj, kiuj rilatas al la kuracaj substancoj de la fruktoj: proteinoj, vitaminoj, mineraloj, saloj, oligoelementoj, kiuj helpas metaboli la sukeraĵojn, la grasojn kaj la proteinojn. Krom tio, ili agas en la afekciitaj organoj. La fruktoterapio estas nutra kaj kuraca fonto por la homaj estaĵoj. La vorto "frukto" devenas el la latina *fructus*, kiu signifas vicleco, profito.

Klasifiko de fruktoj

Oni povas klasifiki la fruktojn en dolĉaj, acidaj, duonacidaj kaj neŭtraj fruktoj. La acidaj fruktoj estas tre bonaj por malpliigi la kolesterolon kaj la ureatan acidon. La duonacidaj fruktoj estas plenaj de proteinoj de alta biologia valoro. La neŭtraj fruktoj estas plenaj de proteinoj, vitaminoj, mineraloj, saloj kaj oligoelementoj.

Ne taŭgas trinki sukron de fruktoj post la manĝo. Oni devas fari tion unu horon antaŭ ol manĝi aŭ unu horon post manĝado. Oni devas manĝi la oranĝon sole. La oranĝo estas oro dum la mateno, arĝento dum la posttagmezo kaj plumbo dum la vespero. La dolĉaj fruktoj povas esti manĝataj kiam ajn dum la tago. Oni ne devas manĝi deserten, ili malhelpas la digeston.

Ne taŭgas miksaĵoj

La fruktosalato povas esti farata nur el dolĉaj fruktoj. Ekzistas fruktoj kiujn oni ne devas miksi, ĉar tiam ili produktas ĥemiajn reagojn malbonajn por la organismo. Nepre ne miksu

- oranĝon kun karoto: ili multobligas la acidecon, provokas misfunkciojn en la hepato, stimulas tro da galo;
- ananason kun laktaĵoj: tio estas forta toksaĵo, kiu mortigas blatojn;
- papajon kun citrono: tio kaŭzas problemojn de hemoglobino kaj okazigas anemion;